

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

oktobro/decembro 1993



37a jarkunveno en Titisee

La folkloro societo Oberried prezentis ne nur viglajn dancojn kaj kantojn,
sed eĉ mirige belsonan koncerton per sonoriloj de bovinoj.

Herbsttagung in Titisee

Die Freunde der Internationalen Sprache, die sich zur 37. Jahresversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten (GEFA) in Titisee trafen, konnten die Vorzüge des heilklimatischen Kurortes nur wenig genießen. Denn das attraktive Programm für das Treffen vom 8. bis 10. Oktober 1993 war umfangreich. Im modernen Kurhaus der Schwarzwaldgemeinde begrüßte dessen Direktor Janßen herzlich Esperantisten aus ganz Deutschland sowie aus Belgien, Großbritannien, Österreich und der Schweiz. Die Arbeit der Eisenbahner-Esperantisten sei zu loben und anzuerkennen, so Genotte, der BSW-Vertreter des Bezirksvorstands Karlsruhe, da die sprachliche Verständigung mit ausländischen Kollegen gefördert werde. Den musikalischen Teil der Festveranstaltung, auch für den anschließenden Abendanzug, bestritt der Musikverein Freiburg. Der gern gehörte Tenor L. Fluck erfreute die Zuhörer mit klassischen Gesängen in Esperanto.

Zuvor traf sich der Arbeitsausschuß mit den Bezirks- und Sonderbeauftragten. Auch die Bezirksbeauftragten des Bahnsozialwerks der Deutschen Reichsbahn nahmen an der Sitzung teil. GEFA-Vorsitzender J. Gießner erläuterte die gegenwärtige schwierige Lage der Vereinigung. Nach der derzeitigen Erkenntnis wird GEFA sich auch in der künftigen Stiftung Eisenbahn-Sozialwerk betätigen können. In der Arbeitssitzung wurden außerdem nationale und internationale Esperanto-Veranstaltungen behandelt, ferner Ergebnisse des Fernkurses, Mitwirkung bei internationalen Arbeitsgruppen, Werbung für das Eisenbahnfachwörterbuch und die Gestaltung des GEFA-Organs. Die Senioren werden sich am 21. April 1994 in Kassel treffen. Die 38. Jahresversammlung soll vom 7. bis 9. Okto-

ber 1994 in Lübeck stattfinden und die nachfolgende 1995 im Bezirk Dresden.

Besondere Beachtung verdienten zwei Referate von Dr. W. Bormann. Er schilderte seine Erkenntnisse über ein Seminar für Dolmetscher, bei dem sich Vertreter und Befürworter des Esperanto bohrenden Fragen stellen mußten. In einem zweiten Vortrag ging es um die Zukunft der deutschen Eisenbahn auf dem künftig liberalisierten Transportmarkt.

Die BSW-Fotogruppe Villingen gab mit einer vertonten Diaserie einen eindrucksvollen Einblick in die vier Jahreszeiten des Schwarzwaldes. Seine herbstlich-sonnige Schönheit erlebten die Tagungsteilnehmer bei einem Busausflug, der durch das Bärenal zum Feldberg führte, von da über das Wiesental zum berühmten Barockdom St. Blasien. Dabei durfte die Kaffeepause nicht fehlen.

Die sonntägliche Matinee leitete GEFA-Vorsitzender J. Gießner mit einer nachdenklich stimmenden Betrachtung über die ungewisse Zukunft der Eisenbahner-Esperantisten ein. Bahnreform, laufender Stellenabbau, Überalterung der Mitglieder sowie die allgemein ungünstige Wirtschaftslage werden nicht ohne Konsequenzen für die weitere Betätigung sein (siehe auch den Jahresbericht in dieser Ausgabe). Fröhliche Akzente setzte dagegen eine Folkloregruppe aus Oberried. Sie sang Heimatlieder, zeigte Volkstänze aus dem Schwarzwald und aus anderen Ländern und musizierte sogar mit Kuhglocken. Den Vormittag beschloß ein Videofilm von R. Büsche über den IFEF-Kongreß 1992 in Münster.

Noch einmal nahmen die 90 Tagungsteilnehmer ein gemeinsames Essen im Kurhaus ein, ehe sie die Heimfahrt antraten.

Ihr Dank galt vor allem den rührigen Kollegen K. Bernhard und H. J. Riehn, die für den Bezirk Karlsruhe die Veranstal-

tung ausgerichtet hatten. Auf Wiedersehen im Herbst 1994 in der Hansestadt Lübeck.
W.B.

Jarraporto

pri la periodo de la 36a ĝis la 37a Jarkunvenoj (1992/93)

Enkonduko

En la lastjara raporto mi skribis en la unua frazo, ke ne alie eblas ol kvazaŭ skribi daŭrigon de la antaŭjara enkonduko. Kaj ĉi-foje mi devas agi same, ĉar la situacio tiam priskribita neniel ŝanĝiĝis. Male, ĝi pliakraĝis paralele al la politika, ekonomia kaj humana situacioj, kaj tio ne nur en Germanio, sed ĉie ajn en la mondo.

La kunigadon de la du germanaj fervojoj kaj ties privatigon la gvidaj personoj kaj la ŝtato estas antaŭen puŝantaj per ĉiuj rimedoj, tiel ke la fervojistoj, ja eĉ la emerituloj ankoraŭ ne scias, klujn konsekvencojn ili renkontos. Ili nur sentas, ke la estonteco portos en si multe da danĝeroj kaj postulos personajn oferojn. Neniel tia situacio taŭgas por vekli intereson por ne "vivnecesaĵ" okupoj, kiel estas ekzemple lernado de lingvo, kiu eĉ ne donas materi-ajn avantaĝojn. Tiam neintereson oni devas konstati ĝenerale rilate al ĉiuj specaj kluboj kaj societoj. Tamen tio neniel povas esti konsolo, sed nur postulo al ni ĉiuj, sen-interrompe kaj per ĉiuj rimedoj klopodi por savi nian asocion.

Niaj mortintoj

Forlasis nin jenaj membroj, pri kies morto ni ekscias:

Fritz Jentsch	(82) 04. 10. 92
Alois Hans	(64) 26. 10. 92
Kurt Fiedler	(74) okt. 92
Anna Blanke	(73) 07. 01. 93
Hanna Schindler	(64) 29. 06. 93

Ili trovu sian eternan ripozon.

Naskiĝtagoj

"Rondaj" naskiĝtagoj de aktivuloj, al kiu ni gratulis:

Alois Hauptenthal 75, Otto Rösemann 70, Klaus Böhnke 60.

Ni ripetas nian dankon pro ilia ĉiama kunlaborado kaj niajn dezirojn por ankoraŭ multaj agrablaj vivojaroj.

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

La malkresko daŭras. Neniel la supre menciitaj kvin mortintaj personoj donas impreson pri la vera nombro da forpasintoj. Tion oni ekkonas el la pasintjare al BSW anoncitaj 373 membroj kompare al 346 por la kuranta jaro. Tio estas timige alta perdo, kaŭzigitaj pro la daŭre kreskanta averaĝa aĝo de la membraro.

1.2 Kursoj

Jam de jaroj apenaŭ ni kapablas aranĝi memstarajn lingvokursojn. Ankaŭ ĉi-jare tio ne eblis. Nur du distriktoj raportis pri po unu nememstara kurso kune kun alia societo. Entute estis anoncitaj kvin novaj membroj.

Pli pozitive oni povas raporti pri la du telekursoj. De la kurso I ĝis nun estas venditaj ĉirkaŭ 360 ekz., de la kurso II estas 75. Sed granda nombro el ili estis menditaj de nefervojistoj. Tial ĉiuj membroj estas petataj, varbi por tiuj kursoj ĝuste inter fervojistoj, ĉar ili permesas lerni la lingvon hejme laŭ plej agrabla metodo. Mendokondiĉoj estas troveblaj en Bulteno 1/93.

1.3 Funkciuloj

La kunigado de la fervojistaj esperantistoj de DB kaj DR en GEFA kaj ŝanĝoj en la fakaj komisionoj de IFEF kaŭzis kelkajn ŝanĝojn ankaŭ inter la funkciuloj de GEFA.

La laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß) kun efiko de 1. 1. 1993 konsistas el Joachim Gießner (prez. kaj redaktoro), Otto Rösemann (anstaŭanto), Hans-Jürgen Riehn (sekr.) kaj Achim Meinel (aferoj de la amaskomunikiloj).

Inter la komisiitoj por specialaj taskoj okazis jenaj ŝanĝoj: prizorgado de la emerituloj: Rolf Terjung; terminara laboro: Horst Theurich kiel germana respondeculo en la nova Faka Komisiono de IFEF. Sen ŝanĝo restis kasisto (Bernhard), instruado (Lautenbach), distribuado de revuoj (Heimlich) kaj la redaktoro de la Terminara Kuriero (Hartig).

Por havi kompletan superrigardon, jen la aktuala listo de la distriktkomisiitoj: Berlin Meinel, Dresden Trochold, Essen Terjung, Frankfurt Kiefer, Halle Mohr, Hamburg Böhnke, Hannover Heimlich, Karlsruhe Bernhard, Köln Herlitze, München Lenz, Nürnberg Stoll, Saarbrücken Hauptenthal, Stuttgart Krüger. IFEF-Komitatanoj estas Gießner, Jasmann, Rösemann.

2. Kunlaboro kun IFEF

La 45a IFEF-kongreso okazis 6. - 12. 6. 1993 en Cervia (Italio). Partoprenis 37 germanoj. Oni povis ĝin nomi "kongreso de muziko", ĉar krom la balo (pli klare diskotekvespero) la vesperaj programoj konsistis el muzikaj prezentaĵoj, parte altkvalitaj, sed sen doni al nia lingvo sufiĉe da okazoj por montri sian taŭgecon ĝuste en muziko. Kompreneble oni povis vidi multajn valorajn trezorojn de la itala kulturo, ankaŭ en la postkongreso.

Plej grava decido en la faka parto estis la

kunigo de la du ĝisnunaj Terminara Komisiono kaj Faka Aplika Komisiono en unu "Faka Komisiono". Ĝi estos kompetenta por la taskoj de ambaŭ antaŭaj komisionoj.

3. Aranĝoj, kontaktoj

Ĉar la 44a IFK okazis en Germanio, la 36a jarkunveno estis aranĝita nur kiel labor-kunveno. Ĝi okazis la 17an de okt. 92 en Fulda. Partoprenis kiel reprezentanto de la Sociala Organizo de DR s-ro Petzold el Berlino.

GEFA-membroj partoprenis kiel kutime en diversaj naciaj kaj internaciaj aranĝoj, i.a. en Ĉeĥio, Francio, Hispanio, Hungario, Pollando, Rumanio, Slovakio kaj Svisio. La prezidanto ĉeestis kiel gasto en la printempa kaj aŭtuna estrarkunvenoj de IFEF. Li ankaŭ vizitis en septembro la internacian fervojistan renkontiĝon en Rumanio. La prezidanto kaj sekretario partoprenis en la german-ĉeĥa kongreso en Karlsbad.

4. Informado, varbado

4.1 Bulteno

Ĝi aperis per 4 regulaj numeroj kun entute 36 paĝoj kaj 4 fotoj. Pro la kaŭzoj menciitaj sur paĝo 2, Bulteno povas aperi nur ankoraŭ kvarfoje jare.

4.2 Amaskomunikiloj

Ni ekscias pri 58 artikoloj koncernantaj agadon de GEFA-anoj.

4.3 Informiloj, ekspozicioj

Ĉirkaŭ mil varbiloj estis disdonitaj en deĵorejoj, BSW-hejmoj, vendejoj, kuracistaj atendejoj, dum vojaĝoj, ktp. Jam multe vendiĝis la bela trikolora leteroj-glumarko "Esperanto - deine zweite Sprache". Ankoraŭ havebla ĉe kasisto Bernhard (vidu artikolon en Bulteno 2/93).

Okazis du ekspozicioj kun ĉirkaŭ mil vizitantoj.

4.4 Kultura agado

Joachim Gießner produktigis en slovaka studio muzikkasedon kaj CD kun 21 slovakaj popolkantoj sub la titolo "Kantoj de l'popolo". Ĉiuj tekstoj estas kantitaj en Esperanto kaj sur slipo aldonitaj (vidu artikolon en Bulteno 3/93). Mendebaj ĉe Gießner.

5. Terminara agado

Pasintjare ni anoncis la preparadon de nia faka Nacia Vortaro. Nun ĝi aperis, danke al la senlaca klopodado de Dieter Hartig. Ĝi enhavas ĉ. 12000 esprimojn sur 400 paĝoj kaj grave helpas en legado kaj verkado de fakaj artikoloj (komp. Bulteno 2/93). Vidu ankaŭ ĉi-supre cif. 1.3.

6. Emerituloj

La ĉi-jara renkontiĝo de niaj emeritaj kolegoj kun familianoj okazis la 22an de aprilo en Duisburg, ĉi-foje bonege prizorgita de Rolf Terjung. Ĉeestis 27 personoj. Bedaŭrinde la ĝisnuna subvencio flanke de BSW forfalis (vidu raporton en Bulteno 3/93).

Perspektivo

Ni ne trompu nin mem. La perspektivo de jaro al jaro plimalboniĝis. Plua tendenco sama. Restas nenio alia ol celtrafe agi, utiligi ĉiun okazon, eĉ malgraŭ la malfavoraj kondiĉoj.

AGU, AGU, AGU !

Gießner
prezidanto

El la grupoj Aus den Gruppen

BSW-Esperantogruppe Weiden.

La 15an de julio 1993 38 gepartoprenantoj de la Internacia Esperanto-Semajno Františkovy-Lázně (Ĉeĥa Respubliko) sub gvido de Josefo Vaneček vizitis la orient-bavarian urbon Weiden. Gemembroj de la Fervojista Esperanto-grupo Weiden bonvenigis ilin ĉe la urbollimo. Dum rondveturado per aŭtobuso la parte korpe malhelpitaj gastoj havis eblecon, rigardi de la najbara monto la panoramon de Weiden, kiu situas en la valo de la rivero Waldnaab. La vidindaĵoj tie kaj la gvidado tra la malnova urboparto tre impresis la gastojn, kiuj venis el kvar nacioj. Fine de la agrabla kunestado ili kontente adiaŭis kaj reveturis tra Waldsassen, kie ili vizitis la fame konatan basilikon kaj la bibliotekon de la monaĥinejo, al siaj hejmoj.

Köln / Essen

70 Esperantistoj, darunter viele Eisenbahner aus den Bezirken Köln und Essen, trafen sich am 3. Oktober zu einer Veran-

staltung der Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Liga unter dem Motto "Zauberhaftes Köln" in den Räumen der Casino-Gesellschaft.

Der Vorsitzende von REVELO, GEFA-Mitglied ObStdRat Wolfgang Loose, konnte auch Esperantisten aus Belgien, den Niederlanden und aus der Tschechischen Republik begrüßen.

UEA-Vizepräsident Dr. Ullrich Lins sprach in einem ausführlichen, mit Dokumenten belegten Vortrag über den Allgemeinen Esperanto-Kongreß 1933 in Köln. Der damalige Oberbürgermeister Konrad Adenauer hatte noch vor seiner Absetzung im März 1933 die Schirmherrschaft für den Kongreß übernommen. Trotz der politischen Ereignisse fand der Kongreß mit 900 Teilnehmern statt. Ein Verbot trauten sich die Naziherrscher damals noch nicht auszusprechen.

Die Esperanto sprechenden Zauberer Schönberner aus Meschede und Linhardt aus der Tschechischen Republik begeisterten mit ihren Vorführungen.

Nach dem gemeinsamen Mittagessen teilten sich die Anwesenden in drei Gruppen auf. Eine nahm an der Stadtführung teil, die andere besuchte das Römisch-Germanische Museum, und die übrigen Teilneh-

mer vergnügten sich bei Spiel und Erzählungen bis zur Kaffeezeit.

Ein herzliches Dankeschön der Esperanto-Gruppe Köln.

Fervoja novaĵoj

Britio

En marto 1994 la Eürotunel-kompanio komencos transporti varojn en konteneroj kaj aliaj kargounuoj de la kombinita trafiko. Ekde aprilo veturos inter Paris kaj London Eüro-Star-pasaĝertrajnoj. La tunelkapacito servas duone al transporto de person-aŭtoj kaj kamionoj sur specialvagonoj. Nur la 6an de majo 1994 sekvos la solena malfermo de la Eürotunelo en ĉeesto de la brita reĝino kaj franca prezidento.

Ĉinio

La forta kresko de la Ĉina ekonomio montras siajn sekvojn ankaŭ en la fervojo. Pliboniĝos la ekzistanta fervojreto. Precipe estas akcelata elektrizado kaj dutrakigo. Konstruiĝos ankaŭ novaj linioj taŭgaj por grandrapidaj trajnoj, ekzemple la 1330 km longa linio inter Peking kaj Schanghai.

Germanio

La fervojlinio inter Chemnitz kaj Chomutov (Komotau) tra Bärenstein - Vejprty (Weipert) malfermiĝis denove la 1an de aŭgusto 1993. Ĉiutage trafikas kvar paroj da pasaĝertrajnoj krom kelkaj vartrajnoj.

Norvegio

La norvega registaro konsentis evolui la ĉefajn fervojliniojn, tiel ke IC-trajnoj povas atingi 200 Km/h. Norvegaj Ŝtatfervojoj (NSB) intencas havigi pendolajn trajnojn por aliaj linioj. Tiuj trajnoj trafikos precipe sur la linio Hamar - Trondheim.

Rusio

Rusaj Ŝtataj Fervojoj komisiiis germanan konsultan firmaon esplori, kiamaniere la 650 Km longa linio inter Moskau kaj St. Petersburg povas esti modernigata, por redukti la veturtempon al 4 horoj kaj 20 minutoj.

Svisio

Ekde somera horaro 1994 trafikos francaj grandrapidaj TGV-trajnoj inter Lausanne, Bern kaj Paris sub komuna reĝimo de SBB / SNCF. Tiu privatekonomia kompanio havos certan tarifaŭtonomion.

Fonto: "Wir" / "Fahrt frei" 8/93 W. B.

Francio - Hispanio

Fine de 1992 Francio kaj Hispanio subskribis kontrakton, kies celo estas la konstruado de linio por grandaj rapidoj inter Perpignan en Francio kaj Barcelona en Hispanio. Oni intencas realigi la planon ĝis la jaro 2002. La nova linio mallongigos la vojaĝtempon inter Lyon kaj Barcelona de nun sep al tri horoj.

Francio - Italio

Similajn planojn anoncis Francio kaj Italio. Ili antaŭvidas konstruadon de grandrapida linio inter Lyon kaj Torino ĝis la jaro 2000. Poste la TGV (la franca grandrapida trajno) bezonos inter tiuj du urboj 1 horon kaj 40 minutojn kompare al nun 4 horojn. De Paris al Torino la vojaĝtempo

mallongiĝos de nun 6 horoj 10 minutoj je preskaŭ la duono. La plano estas grava parto de la antaŭvidita tuteŭropa grandrapida reto.

Kanado

La Kanada Fervoja Kompanio aranĝas transportojn de duetaĝaj konteneroj inter la okcidenta kaj orienta marbordoj. Por ebligi tion, oni antaŭe devis pligrandigi la liberspacan profilon en pluraj tuneloj je 51

cm. Nun oni povas transporti la kontenerojn unuj sur la aliaj de oceano al oceano. Por tiaj transportoj estas je dispono ne nur du- kaj kvaraksaj kontenerovagonoj, sed ankaŭ kvinaksaj plurartikaj vagonoj. La kondiĉoj por tiaj transportoj estas aparte favoraj, ĉar la distancoj estas multe pli grandaj ol en Eŭropo kaj ekzistas malpli da tuneloj kaj superpasejoj de ŝoseoj. Krome nenie estas elektra kontaktodrato.

El "Blickpunkt" 1/93

Jogi

Nachruf

Wie wir erst verspätet erfahren haben, verließ uns Gebhard Jocham, geb. 7. 9. 1943, für immer am 24. 6. 1993 nach langem, schweren Leiden. Er war ein vorbildlicher Esperantist, der auch öffentlich viel für unsere Sprache getan hat. Er hat Kurse abgehalten und zahlreiche IFEF-Kongresse und deutsche Jahresversammlungen besucht, als letzte die 35. in Fried-

richshafen, obwohl ihm schon damals seine Krankheit die Teilnahme sehr erschwerte. Lange Zeit war er stellvertretender Bezirksbeauftragter im Bezirk Stuttgart und ist in dieser Eigenschaft manches Mal eingesprungen. Wir werden diesen bescheidenen und hilfsbereiten langjährigen Mitarbeiter nicht vergessen und wünschen ihm den ewigen Frieden.

GEFA

Esperanto bei Langenscheidt

Jetzt auch Wörterbücher in Esperanto. Das neue Verlagsverzeichnis bietet auf Seite 63 folgende Wörterbücher an: Deutsch - Esperanto Krause, 596 S., geb., 12 x 19 cm, DM 39.80, ISBN 3-324-00290-7, Kompaktwörterbuch Krause, erstmals beide Richtungen, 24000 Stichwörter, 472 S., geb., 9,6 x 15,1 cm, DM 24,80, ISBN 3-324-00607-4, in jeder Buchhandlung zu bestellen.

Grandanima donaco

Okaze de la 37a jarkunveno en Titisee nia malnova meritplena membro Heinz Schindler donacis - ankaŭ en la nomo de sia mortinta edzino Hanna - al GEFA kaj IFEF po mil markoj. Ambaŭ organizoj tutsincere dankas al Heinz pro tiu mono, kiun GEFA uzos por varbado kaj IFEF por terminaraj elspezoj rilate al "Esperanto en la UIC-terminaro".

Briefverschlusßmarken

Esperanto - Deine zweite Sprache

Wir machen darauf aufmerksam, daß noch Briefverschlusßmarken zu haben sind. Sie sind auf Bogen zu je 14 Marken zusammengefaßt. Der Preis pro Bogen ist 0.60 DM, eine Marke kostet also etwa 4 Pf. Sie werden nur in ganzen Bogen abgegeben. Bitte anfordern bei Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8, 67063 Ludwigshafen/Rh., Tel. 0621/510782.

Bitte den errechneten Betrag vorher auf Konto 953 729 bei Sparda-Bank Frankfurt(Main), BLZ 500 905 00, für Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten mit entsprechender Angabe auf dem Überweisungsträger einzahlen. Dabei folgende Beträge für Porto hinzurechnen: bis zu 2 Bogen 1 DM, bis zu 6 Bogen 2 DM, mehr als 6 Bogen 3 DM.

Kompetenta informilo estas

**FERVOJA TERMINARO
ESPERANTO - GERMANA**

por fervojaj esperantistoj, kiuj legas aŭ verkas fervojfakajn artikolojn, sed nepre ankaŭ ŝajna por ĉiu ajn esperantisto.

Ĉi: devus posedi nian

FERVOJAN TERMINARON
de GEFA por povi montri, ke Esperanto estas vigle vivanta lingvo!

1 Fervoja Terminaro: 19.50 DM
3 Fervojaj Terminaroj
aŭ pli po 17.50 DM

Mendu ĉe Dieter Hartig

GEFA

poŝtkarte: Kasseler Str. 76, D - 28215 BREMEN
telefone: 0421 35 33 39, deĵore: Ga 28 / 195 BREMEN

Al niaj gelegantoj ni deziras agrablajn adventajn semajnojn,
benitajn festotagojn kaj por la venonta jaro bonon kaj pacon
GEFA

Redaktofino por n-ro 1/94 estos la 28. 02. 1994

Herausgeber/eldonanto: Bundesbahn-Sozialwerk, Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, 37412 Herzberg am Harz
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Kleine Annenstr. 34, 28199 Bremen
Druck/preso: Druckerei u. Verlag Otto Zander, Lindenstr. 16, 37412 Herzberg am Harz